

VOL. II

FEBRUARY, 1908

No. 2 (Serial Number 14)



The American ESPERANTO JOURNAL

COPYRIGHT, 1907, BY THE AMERICAN ESPERANTO COMPANY


MODELO No. 12.

VIDEBLECO
SIMPLECO
FORTIKECO

Intersangeblaj

Literar-

Portiloj



LA
SKRIBMAŜINO
FOR
ESPERANTISTOJ

Meĥanike

Unuformaj

Presajoj

LA HAMMOND'A SKRIBMAŜINO

gazwsxedcrfvtgb yhnujmikŝolĉpĵĝ
QAZWSXEDCRFVTGB YHNUJMIKŜOLĈPĴĜ
1" 2+ '3\$^4x^5!- 6ĥ;7':8(,9).0?ŭ

LA INTERSANGEBLA LITERARO

THE HAMMOND TYPEWRITER CO.,
SIXTY-NINTH STREET AND EAST RIVER, NEW YORK, N. Y., U. S. A.

Affiliated Esperanto Organizations in the United States

<i>Name of Organization</i>	<i>Secretary</i>
American Esperanto Association	J. F. Twombly, Boulevard Station, Boston, Mass.
Los Angeles Esperanti Association.....	Ralph Bond, 232 S. Hill St., Los Angeles, Cal.
Auxiliary Language Association.....	Prof. James Main Dixon, University of S. California, Los Angeles, Cal.
San Diego Esperanto Society.....	Dr. C. G. Gearn, 2545 Front St., San Diego Cal.
Colorado Esperanto Association	Mrs. Maude W. Miks, 2622 Gilpin St., Denver, Col.
New Britain Esperanto Club.....	Rolland B. Moore, Box 700, New Britain, Conn.
Washington Esperanto Society.....	Charles W. Stewart, 1211 Kenyon St., N. W., Washington, D. C.
Emory Esperanto Club.....	Jack Dempsey, Emory College, Oxford, Ga.
Illinois Esperanto Association	Edwin C. Reed, Ashton Block, Rockford, Ill.
Chicago Esperanto Society.....	J. Howard Pearson, 551 S. Waller Ave., Chicago, Ill.
Leibniz Esperanto Club.....	Adolph Kroch, 126 Randolph St., Chicago, Ill.
University of Chicago Esperanto Society..	Charles F. McElroy, 5520 Madison Ave., Chicago, Ill.
Elgin Esperanto Society.....	Joseph J. Burita, 114 Crighton Ave., Elgin, Ill.
La Juna Stelaro.....	D. A. Johnston, Y. M. C. A., Rockford, Ill.
Rockford Esperanto Society.....	Derwent Whittlesey, 1815 Elm St., Rockford, Ill.
Indiana Esperanto Association	Mrs. Winifred S. Stoner, U. S. Marine Hospital, Evansville, Ind.
Juna Espero Esperanto Society.....	Miss Julia Bierbower, 610 Upper First St., Evansville, Ind.
Non Nobis Solum Esperanto Club.....	Miss Sadie Rucker, 1205 Chandler Ave., Evansville, Ind.
Indianapolis Esperanto Society.....	Miss Mary McEvoy, 21 E. Ohio St., Indianapolis, Ind.
Kansas State Agri. Coll. Esperanto Club.	E. M. Johnston, 530 Humboldt St., Manhattan, Kan.
Portland Esperanto Society.....	Herbert Harris, The Churchill, Portland, Me.
L'Espero Esperanto Society.....	Mrs. A. D. Bird, 40 Camden St., Rockland, Me.
Mass. Agri. Coll. Esperanto Club.....	E. Victor Bennett, 25 North College, Amherst, Mass.
Boston Esperanto Society.....	Edward K. Harvey, Mass. Institute of Technology, Boston, Mass.
Esperantaj Pioniroj.....	William J. Graham, Perkins Institution, South Boston, Mass.
Kantabrigia Esperanta Grupo.....	Mrs. Estelle M. H. Merrill, 45 Bellevue Ave., Cambridge, Mass.
Harvard Esperanto Society.....	N. W. Frost, 32 Hollis Hall, Cambridge, Mass.
Marsh Esperanto Club.....	F. W. Woolway, 77 Union St., Newton Centre, Mass.
Worcester Esperanto Society.....	Herbert K. Cummings, Worcester Polytechnic Institute, Worcester, Mass.
Winona Esperanto Club.....	Thomas B. Hill, 309 E. Fifth St., Winona, Minn.
Good Templars Esperanto Club.....	Harry C. Walsh, care of M. M. Co., Missoula, Mont.
First Nebraska Esperanto Club.....	Mrs. E. A. Russell, Ord, Nebr.
Searchlight Esperanto Club.....	Dr. E. W. Newell, Searchlight, Nev.
Auburn Esperanto Society.....	Clarence F. Welsh, Recorder's Office, Auburn, N. Y.
Brooklyn Esperanto Society.....	Durbin Van Vleck, 154 Hancock St., Brooklyn, N. Y.
New York Esperanto Society.....	Andrew Kangas, 1061 Prospect Ave., New York City, N. Y.
Columbus Esperanto Society.....	Miss Carrie Southard, 1432 Highland Ave., Columbus, O.
Esperanto Club of Ohio State University.	Charles W. Park, Ohio State University, Columbus, O.
Toledo Esperanto Club.....	H. S. Blaine, Box 999, Toledo, O.
Philadelphia Esperanto Society.....	E. Clive Hammond, 1711 Summer St., Philadelphia, Pa.
Warren Esperanto Club.....	W. L. MacGowan, Supt. of Schools, Warren, Pa.
Providence Esperanto Group.....	Frederick E. Cooper, 11 Hayes St., Providence, R. I.
Jamestown Esperanto Club.....	Leo V. Judson, 101 Wood St., Norfolk, Va.
Seattle Esperanto Society.....	William G. Adams, 309 Twenty-seventh Ave., Seattle, Wash.

"SERENADO"

A New Song Published in Esperanto for High Voice

Sweet — Sparkling — Melodious.

**"SHOULD BE A FAVORITE FOR SINGERS." MUSIC BY MARIA T. BIRD
POETRY BY MONTAGUE C. BUTLER, L. R. A. M.**

PRICE, 35 CENTS

AMERICAN ESPERANTO ASSOCIATION
BOULEVARD STATION BOSTON, MASS.



THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL



A MONTHLY MAGAZINE DEVOTED TO THE INTERNATIONAL LANGUAGE.

PUBLISHED BY THE AMERICAN ESPERANTO COMPANY
211 WEST 126th STREET NEW YORK CITY, U. S. A.

CABLE ADDRESS: ESPERANTO NEW YORK.

Vol. II. No. 2. (14).

FEBRUARY, 1908.

PRICE, 10 CENTS.

SUBSCRIPTION PRICE

One Year \$1.00
Six Months50

Subscriptions can commence with any number.

The Editor reserves the right to correct all manuscripts. Unavailable contributions he will return IF the writer sends postage stamps or international coupons, but not otherwise.

If contributions are not typewritten, they must be very carefully written by hand.

Articles on distinctively American subjects will be especially appreciated by the Editor.

ADVERTISEMENTS

For advertising rates, see fourth page of cover.

"NI KREDAS JE LA NETUSEBLECO DE LA ESPERANTA FUNDAMENTO ZAMENHOFA"

Usona Esperantisto en Rusujo

NE longe post kiam mi eklernis Esperanton mi enskribigis mian nomon en la "adresaron" de Doktoro Zamenhof. Tiam komencis fluo de poŝtkartoj el ĉiu parto de la terglobo, kun diversaj petoj (principe por ilustritaj poŝtkartoj) kaj inter ili troviĝis unu de sinjoro en Sud-Rusujo, kiu deziris usonan korespondanton. De poŝtkartoj la afero kreskis je graveco; leterojn eĉ portretojn ni interŝanĝis; la leteroj pli oft- kaj plilongiĝis ĝis kiam, post du jaroj de tia korespondado, mi sentis ke mi havas veran amikon en S-ro. Dimitri Vasilieviĉ Speranskij, de vilaĝo Sumi; kaj mi fortege deziris lin vidi.

Tiu deziro estis reciproka, kaj kiam li sciigis pri mia intenco viziti la Trian Kongreson, S-ro Speranskij tutkore petegis min daŭrigi mian vojaĝon kaj pasigi someron en lia patrujo. Komprenoble mi iom ŝanceliĝis, ĉar neniu vorton rusan mi konis; li ne konis unu anglan, kaj mi neniam parolis esperante! Sed li ne volis akcepti rifuzon, kaj sendadis tiajn afablajn leterojn, kun karto de la ĝusta vojo, sciigo pri kosto, k.t.p., ke mi tute ne povis ŝanceliĝi plu, kaj plezure akceptis lian inviton.

En Kemabriĝo mi baldaŭ lernis ke timoj pri mia lerteco kompreni kaj paroli Esperanton estas nenecesaj, ĉar tie mi facile interparolis kun samideanoj de dudek diversaj nacioj.

Inter ili estis D-ro. Krukowski, de Varsovio, kiu poste helpis min kiam mi alvenis en lian urbon.

Post la Kongreso mi iris Rusujon, ŝargite de malgranda valizo kaj grandega pasporto. Mia vojo estis laŭ Berlino, Varsovio, Kievo ĝis Sumi (proksimume Harkof). Ĉe la landlima urbo Aleksandrov komencis miaj doloroj. Kiom mi soporis pri esperantista tradukisto tie, kaj kiom estas necesa tia homo, ne sole tie sed en ĉiu landlima urbo! Multajn sciigojn donis al miaj surdaj oreloj la lukse vestitaj oficistoj pri forpreno de mia pasporto, serĉado de pakajo, elpreno de libroj kaj kiamaniere mi povos repreni pasporton. Se ne okaze ĉeestis fraŭlino kiu



La teruraj biletoj por rusaj vagonarvojaĝantoj.

komprenis ambaŭ rusan kaj anglan mi nun estus en Alekandrovo serĉante tiun oficiston kiu ŝtelis mian pasporton.

Ĉe Varsovio D-ro. Krukowski renkontis min en la stacidomo (kiel ni estas aranĝintaj), kaj veturadis kun mi ĝis alia stacidomo, aĉetis novajn biletojn kaj diversmaniere zorgis pri mia komforto. Plej oportune estis ke li tiun faris, ĉar tiame mi tute nescias ke en Rusujo oni devas aĉeti tri biletojn: unu je la vagonaro, la duan se ĝi estas rapida vagonaro, kaj la trian por permeso al oni sidi!

Vi devas rimarki ke D-ro. Krukowski ne komprenas la anglan lingvon; li nur povas paroli pole, ruse, germane, france kaj iom itale. Tial nia interparolado devigis esti Esperanta. La longa veturado Kievon fariĝis al mi pli interesa per miaj klopodoj paroli per manoj, kapo kaj eĉ piedoj kun germano kaj ruso kiuj sidis en la sama vagono.

Antaŭ mia foriro S-ro. Speranskij estis skribinta ke li certe venigos amikojn en Kievo por helpi min sed, kvankam mi jam ricevis poŝtkarton sciigantan ke la urba grupo estos tre kontenta min ricevi kiel gasto dum mia restado, tamen tiaj sciigoj ŝajnis al mi tro bonaj kaj mi konfesis ke mi ne tute konfidis al ili. Imagu, do, mian ĝojon kaj surprizon kiam, malsuprenirante sur trotuaron mi trovis komitaton da kvin sinjoroj, entuziasmaj esperantistoj kiuj staris pretaj por min saluti kaj konduki min al jam elektita ĉambro en hotelo!

Kaj plie mian ĝojon kiam, post tre bongusta tagmanĝo kun miaj novaj amikoj, mi aŭdis pri la aro da plezuroj kiujn mi havos dum la venontaj du tagoj laŭ ilia gvideco! Mi ne povas, pro manko da spaco, rakonti eĉ la nomojn de ĉiu glora vidaĵo kiun mi vizitis en tiu urbo, la antikva ĉefurbo de Rusujo, urbo tiel granda kiel Bostono kaj al kiu venas ĉiutage miloj da pilgrimoj. Ĉar Kievo estas la centra urbo de rusa religio ortodoksa kaj tie ĉi troviĝas "La Lavra," granda "St. Peters" de Rusujo. Kiel tradukanto dum bonega koncerto de la Simfonia Orkestro mi havis studenton en Kieva Universitato junulon kiu havas tre radikalajn opiniojn pri politikaj kaj



Pruvo de usoneco.

socialoj aferoj. Lia fortega sento pri tiuj aferoj, tiom interesaj kaj tiom diskutataj en lia lando, kaj lia kuraĝo sciigi siajn opiniojn certe altiros al li baldaŭ (mi timas) la atenton de policestro. Mi certe kunsentis tute kun li, kaj tiu unua vespero en stranga urbo, tiuj novaj ideoj de la samideano, la belega muziko, la strangaj uniformoj de Kosakaj oficiroj—ĉiuj faris sur mi neforgeseblan impreson.

Mia vizito al "Lavra," aro de belegaj preĝejoj, granda monaĥejo kun 2,000 monaĥoj, okazis la sekvantan tagon kun S-ro. Füller kiel tradukisto, kaj unu el la ĉefaj monaĥoj kiel gvidisto.

Mi rimarkis ke kien ajn tiu monaĥo eniris, aliaj monaĥoj kisis lian manon kaj pilgrimoj sin jetis teren kaj kisis lian piedon. Li havis tre afablan vizaĝon, longajn orkolorajn harojn kaj tre dolĉan voĉon, sed ŝajnas al mi ke li farus pli bone se li, anstataŭ beni tiujn mizerulojn, vendus la grandegan oran krucon kiun li portis kaj donis al ili por manĝi. Permeson viziti tiujn preĝejojn kaj eniri en la katakombojn (donatan al tre malmulte da fremduloj) mi ŝuldas al la prezidanto de la Kieva Esperanta Grupo, D-ro. Kovalevski.

Tre kurioza afero okazis en Kievo. Mi vizitis, kune kun la komitato, la blindlernejon. Bedaŭrinde neniu instruisto aŭ lernanto konis esperanton, sed tamen, dank' al miaj kunuloj, mi lernis multon pri la rusa metodo de instruado al blinduloj. Unu blindulino kiu tre atente aŭskultis la interparoladon tute surprizis min per demando ĉu mi konas iom pri Fraŭlino Helen Keller? Kiam mi respondis jese, kaj plie ke mi loĝadas proksime al ŝia urbo, la junulino ŝajnis treege ravigita kaj renversis sur mian kapon veran akvegdon da demandoj pri ŝia hejma vivo, ŝia eksteraĵo, ŝia laboro, k.t.p. Miaj samideanoj devis tre rapide traduki por kontentigi tiun scivolemulinon.

Baldaŭ mi sciigis ke unu instruisto jam legis al la klaso la "Rakonto Pri Mia Vivo," de Fraŭlino Keller, kaj tiu juna knabino, kiu nur havis dektri jarojn, tute enamiĝis je tiu glora usona surd-mut-blindulino kiu antaŭnelonge gajnis tian honoron en Radcliffe 'a Uni-

versitato. Si petegis ke mi alportu al ŝia heroino malgrandan donacon, kaj do donis al mi bele broditan naztukon kiun ŝi mem kudris. Mi ne devas forlasi tiun rakonton ne rimarkante ke Fraŭlino Keller jam diris al mi kiel ŝi jam skribis germane al la knabino por danki ŝin.

Antaŭ ol mi foriris for Kievo la sindonema "komitato" donacis al mi belegan libron kun vidaĵoj de ilia urbo, subskribitan de ĉiuj miaj Kievaj amikoj. Ankoraŭ unufoje mi deziras dankegi S-rojn. Sepe, Zedlmajer, Mynko, Majkowski, k.a., pro ilia afableco. La tuta anaro kuniris kun mi ĝis la stacidomo, aĉetis la biletojn, telegrafis al S-ro. Speranskij pri la ĝusta horo de mia alveno kaj certigis al mi kiom ili ĝojis mian viziton. Neniam mi povos forgesi ilin. "Ĝis la revido!"

Post longa vojaĝo trans la stepoj de Sud-Rusujo mi alvenis Vorobjon kaj tie renkontis min S-ro. Speranskij. Tio vere finis mian rusan vojaĝon, ĉar tiu renkonto estis la celo de ĉiuj miaj pensoj dum ses monatoj.

Imagu mian ĝojon! Ni tuj konis unu la alian, kaj post amika saluto ni energie kaj seninterrompe babiladis ĝis kiam nia vagonaro foriris Sumi'on. Pri malkompreno? Neniom! Ĉio estis facile komprenata, eĉ kvankam mia kara amiko havas bedaŭrindan malhelpon je elparolado.

Mia restado en Sumi estis treege kontentiga. Tie mi partoprenis en la kutima vivmaniero de mia amiko, tute kiel mi estis ano de lia familio. Estis bonega montrado de vivo de rusa meza-klaso en urbo de 30,000 loĝantoj. Dum mia loĝado mi renkontis nenium kiu povis paroli angle. Efektive la polices-tro raportis ke mi



Instruo de piedpilkado al rusaj knaboj.

estas la unua usonano kiu jam eniris en Sumi'on.

Tamen mia interparolado ne estis limigita je S-ro. Speranskij, ĉar la tuta familio (escepte lia afabla patrino) povas paroli esperante kaj eĉ ŝi, antaŭ kiam mi foriris, sciis tiom pri Esperanto kiom mi lernis pri la rusa lingvo. Sed S-ro. Speranskij estis instruinta al kelkaj junuloj la lingvon, kaj multajn gajajn piknikojn, marŝadojn kaj ludojn ni havis kune: Andreo, Nikolaj (12-jara), Sercoĵa kaj aliaj kiuj troviĝas en la grupofotografajo.

La sinjoro kiu sidas je mia maldekstra flanko estas mia mastro; lia frato Paulo sidas apud mi je alia flanko. Ambaŭ sinjoroj estas rimarkinduloj; afablaj, bone edukitaj sinjoroj. Dimitri estas kancelaria oficisto; Paulo, instruisto.

Tiu gaja aro da esperantistoj gastigis min kiel princo per piknikoj, remboatoj, koncertoj, k.t.p., dum mia dusemajna restado en Sumi. Mi ankaŭ pasigis tagon sur granda bieno de S-ro. Lintvarev, malproksime tridek kilometrojn, en kamparo, kaj tie mi provis la bonegajn ecojn de diversaj rusaj piroj, pomoj kaj aliaj fruktoj. Pri ilia bongusto mi plenkore povas atesti. Ankaŭ mi pasigis du tagojn ĉe somerdomo de eminenta advokato Smirnov.

Tiu sinjoro, tre glora ĉasisto, estis terure ĉagrenata kiam oni diris ke mi, kvankam usonano, ne estas forta atletulo, ne povas pafi, maĉi tabakon, blasfemi nek trinki! Kiam, do, dum tiu interparolado mi min malantaŭenapogis en mia seĝo kaj metis miajn piedojn sur tablo, tiam lia ĝojego estis ridinda. Jen fine neniu dubo pri mia nacieco!

Unu lernanto en altlernejo estis aĉetinta en Germanujo piedpilkon (sferan laŭ angla speco) kaj



KELKAJ ESPERANTISTOJ EN SUMI, RUSUJO.

Starantoj: Konorov, Andrej Konorov, Postalenko, Zajcev, Levickij, Naumenko kaj Orobĉenko. Sidantoj: P. Speranskij, E. K. Harvey kaj D. Speranskij.

kelkaj lernantoj petis ke mi instru al ili "la noblan ludon." Tre volonte mi tion faris kiel eble plej bone, per montrado kaj parolado (kompreneble esperanta), sed tial ke mi nesciis la anglan metodon kaj ili ne deziris lerni la usonan, evolviĝis stranga ludo kiu certe troviĝas nenie ajn krom en Sumi. Mi promesis sendi al Sumi la ĝustan regularon tradukitan en Esperanton. Estis ridinde rimarki la surprizon (eĉ teruron) sur vizaĝoj de instruistoj kiam mi partoprenis en knabaj ludoj. Tia interrilato de instruisto kaj lernanto ne estas kutima en Rusujo.

Sed sendube la plej bona parto de mia rusa vizito estis la kvietaj vesperoj kiujn mi pasigis kun Dimitri ĉe lia familio, interparolante, ludante sur fortepiano aŭ per ŝakoj, aŭ aŭskultante dum li tradukis diversajn popolarakontojn. Kiam fine mi devis foriri

mi tion faris kun granda malĝojo kaj multaj promesoj ke mi revenos kiel eble plej baldaŭ.

En Kievo mi haltiĝis dum unu feliĉa tago kun la universitataj studentoj Dobszanski Postalenko kaj Mynko. Poste en Vārsovio mi restadis du tagojn kie D-ro. Leono Zamenhof (la majstro estis en Ostendo), D-ro. Robin kaj S-ro. Niemojevski amike montris



TIPA RUSA KAMPARANA DOMETO.

S-ro. Speranskij, S-ro. Harvey kaj kampara knabo. Rimarku la pajlan tegmenton kaj plektitajn barilojn.

al mi ĉiujn vidaĵojn. Mia amiko Krukowski estis bedaŭrinde malsana. Pro manko da spaco mi ne povas rakonti pri miaj spertadoj en la ĉefurbo de Polujo, la naska urbo de Esperanto, sed mi nur diros ke kiam mi foriris el Rusujo estis post unu tuta rondo de gasteco kaj afableco de niaj rusaj samideanoj. Vivu Esperanto en Rusujo!

EDWARD K. HARVEY.

Kelkaj Proverboj de Benjamin Franklin

Ne manĝu ĝis la malspriteco; ne trinku ĝis la malmodereco.

Parolu nur tion kio povus profiti aliajn aŭ vin mem; evitu senprofundajn interparoladojn.

Perdu nenian tempon; ĉiam okupu vin per io utila; forigu ĉiujn agadojn ne necesajn.

Toleru nenian malpuraĵon rilate al la korpo, la vestoj, aŭ la loĝejo.

Ne konfuziĝu pri bagateloj, aŭ okazoj ordinaraĵ aŭ neeviteblaj.

Puŝu vian aferon; ne lasu al via afero vin puŝi.

Una nuna tago valoras du estontajn tagojn. Kiu havas okupadon, tiu havas oficon de profito kaj honoro.

Se vi aĉetos tion kion vi ne bezonas, post mallonga tempo vi vendos viajn necesajojn.

Tenu viajn okulojn tute malfermataj antaŭ la edziĝo; poste, duonfermataj.

Tiujn kiuj ne volas ricevi konsilon, oni ne povas helpi.

Oni povas, ne sciante ŝpari, teni sian nazon la tutan vivon sur la akriĝilego, kaj morti ne havante kvar pencojn.

Esperantigis RAY V. JORDAN.

Miksajo Por la Dulingvanura Leganto

There once was a poor sentaŭgulo,
Who, every one said, was a fool, O!
He took his vortaro
To find an omaro
Anstataŭ rigard' en spugulo!

Fraŭlino would learn Esperanto;
Si serĉis atente a man to
Instruct her, should he know,
Became his edzino—
Kaj tiel finiĝas my kanto!

—El la Roxbury Latin School Tripod.

Pri Esperantista Festotago

PLENUMANTE la decido de la Tria Kongreso, D-ro. Zamenhof elektis komitaton de sep membroj por proponi daton por la tutmonda festotago, principe jam akceptita de la kongreso. Jen la provizoraj proponoj de la komitatanoj:

(a) la daton de 17a de Decembro (dato de la unua festo esperantista en la jaro 1878);

(b) la tagon de la printempa (por la suda hemisfero: autuna) tagnoktegalco, kiu povus servi kiel simbolo al la neŭtraleco por la tuta homaro.

La majstro aldonas, ke tiu provizora opinio ne havu iun influon ĉe la decido.

Al la dato de la 17a de decembro aliĝas Sinjoroj Codorniu kaj Pollen; al la dato de la 21a de Marto Sinjoroj Montrosier kaj Simon. Sinjorino Hankel timas ke tiuj datoj estus tro proksimaj al la kristnaska respektive kelkafoje al la Paska festo. Ŝi kaj Sinjoro Tabeuski denove proponas la 21an de Julio. Tiun daton S-ro. Tabeuski jam antaŭ kelkaj monatoj proponas en *Tra la Mondo*, kiel festotagon de la dudeka jubileo de la momento, "kiam nia majstro transiris la Rubikon," kaj efektive multaj esperantistoj festis tiun daton. Nia majstro aldonas ke laŭ lastaj esploroj, farintaj de li mem montriĝis ke:

(1) La dato en kiu la unua libro pri Esperanto ricevis la cenzuran permeson, estis ne la 21a de Julio, sed la 2a de Junio (21a de Majo laŭ rusa kalendaro.)

(2) El ĉiuj aliaj datoj koncernantaj la komencan historion de Esperanto kun plena precizeco estas konata nur la dato de la 17a de Decembro, 1878.

En la nomo de la komitato, kies sekretario mi estas, mi havas nun la honoron, peti la esperantistan gazetaron, ke ĝi bonvole represu tiun raporton kaj invitu iliajn legantojn, sendi al mi kiel eble plej baldaŭ iliajn opiniojn. El tiuj leteroj ricevotaj mi faros raporton por la komitatanoj, kiuj poste voĉdonos definitive. La Kvara Kongreso estos petata je ĝia lasta sankcio.

PROF. OTTO SIMON.

Kun esperantista saluto.

Je la Jarŝanĝo

Pasintá estas jaro.
Sur tero la homaro
Fervore respektigu Lin,
La Mastron, la Sinjoron,
Sciigu Sian gloron,
Ĉar Li neniam lasas nin.

Li donis la nutraĵon,
Li zorgis pri vestaĵon
De la komenco ĝis la fin';
Li gardis en danĝero,
Li helpis nin per pero
De Sia forto. Danku Lin!

Alvenis Nova Jaro.
Anĝeloj kaj homaro,
Pro tio ĝojas, kantas nun,
La bonan Dion laŭdas;
Li niajn preĝojn aŭdas,
Li estu nia kara sun'!

Al ĉiuj Li sanecon
Donacu, feliĉecon,
Prosperon ĉiam sen mezur';
Li benu plu per paco
En domo kaj palaco,
Ĉar Dio estas forta tur'.

A. KRAFFT.

Ruĝa Kruco

Leŭtenanto Bayol kaj doktoro Dupont, helpmajorkuracisto, petas ĉiujn samideanojn militistojn, maristojn kaj ruĝkruacistojn, ke ili bonvolu sendi al ili kiel eble plej multe da dokumentoj, sciigoj, ilustraĵoj, fotografiaĵoj, k.t.p., rilate al Ruĝa Kruco de siaj nacioj.

Ili estas skribontaj multajn artikolojn kaj verkon "Ruĝa Kruco" kun ilustraĵoj. Antaŭan dankon!

Skribu al Leŭtenanto Bayol aŭ Doktoro Dupont, 51a, regimento infanteria, Beauvais (Oise) Francujo.

Kion Fari je la Ruĝhaŭtuloj ?

FREMDALANDANOJ, kaj kelkaj usonanoj, kiuj estimas Usonon lando de diversaj nacioj ofte ne pripensas iel la ĉeeston de la originalaj loĝintoj en ĝi; kaj tamen tiuj



S-RO. FRANCIS E. LEUPP.
La Komisiano de l' Aferoj
Ruĝhaŭtulaj.

ĉi formas problemon plej penigan al la aŭtoritatoj en Washington. Tiu ĉi afero estas tirita al ĝenerala atento antaŭnelonge pro la agitado de la Ute'oj, gento de ruĝhaŭtuloj kies rezervejo estas rajte en la ŝtato Utah. La Ute'oj forlasis sian rezervejon kaj migris South Dakota' on, kaj sur la vojo timigis multajn Wyoming'anojn per sia malamika sintenado. La Ute'oj

plendis—malprave, ĉar oni vidu la kliŝon sur la kontraŭa paĝo—ke sia rezervejo ne estas sufiĉe fruktodona; sed oni sciu ke la registaro, precipe zorgema por la ruĝhaŭtuloj, rezervis por ili sufiĉege da rimedoj akvaj kaj la plej bonan teron apudan, kaj donacis al la blankaj loĝantoj la restaĵon. Tamen la Ute'oj malkontentiĝis. La reala rezono de ilia malkontentiĝo estas ke la Ute'oj, similaj al ĉiuj ruĝhaŭtuloj kiuj ne ankoraŭ akceptis la modernajn faktojn de civilizacio, nur deziris landon en kiu ĉasadi kaj ne esti ĉagrenataj de la blankuloj. Kompreneble tio estas nune nebla. Multaj ruĝhaŭtuloj, kiel la Cherokee'oj, la Creek'oj, la Choctaw'oj, la Chickasaw'oj kaj la Seminole'oj, kiujn oni nomas la Kvin Civilizitaj Gentoj, kaj la Sioux'oj, komprenas ke ne estas spaco por tiuj kiuj volas malhelpi la progresadon, kaj ili akceptis tion kion Usono donis al ili rezignacie, sed el la malamikaj gentoj la Ute'oj estas la plej ĉagreniĝemaj.


Ili forlasis Utah'on kaj insistis kuniĝi kun la Sioux'oj, ĉe Pine Ridge, S. Dak. La registaro timis ke inter la du ruĝhaŭtulaj gentoj estos batalo kaj provis resendi la Ute'ojn, sed pro la malfacileco komprenigi decidon escepte per pafilo—tio kion ĝi ne

volas fari—ĝi kompromizis kaj sciigis al la Ute'oj ke, tial ke ili forlasis sian rezervejon kaj venis al South Dakota, ili devigos prilabori.

La ruĝhaŭtulo ordinare ne ŝatas prilabori. Li ĝin konsideras honto—io nur deca por la virinoj de l' gento. Lia metio, li kredas, estas ĉasi kaj fumi ĉirkaŭ la fajraĵo. Sed nia registaro provis lin konvinki alimaniere. Tial, kiam la ĉirkaŭe 200 malprogresemaĵoj Ute'oj insistis iri South Dakota'on, oni ilin devigis labori sur farota fervojo. Unue ili rifuzis, sed kiam ilia manĝaĵo malpliĝis ĉiutage, ili ŝanĝis siajn decidojn kaj eklaboris pace.

Kelke da ĵurnaloj priskribis tiun ĉi aferon ekscite, sensacie kulpigante S-ron Leupp, la Komisiano de Aferoj Ruĝhaŭtulaj, esti kruele al la "kompatindaj aboriginaluloj de Ameriko," kaj minaci al ili vergadon. Sed S-ro Leupp nur diris efektive al ili: "Estas permesate al vi fari kiel vi elektos. Vi povas labori por via pano aŭ seniĝi je ĝi. Estas permesate al vi manĝi nutraĵon aĉetitan per la rezulto de via laboro aŭ ne manĝi. Se vi decidis malsaĝe, vi—kaj ne la registaro—estos la nuraj suferantoj." Tiam argumenton la ruĝhaŭtuloj ne povis kontraŭstari, kaj ili laboris. Tial morala venko atingiĝis.

Tamen estas multaj el la Ute'oj kiuj estas ankoraŭ kontraŭemaj al la blankuloj. La farmmastroj en Wyoming, inter Utah kaj South Dakota, ankoraŭ plendas ke la Ute'oj kelkfoje alvenas al iliaj farmoj, forŝtelas la bestaron kaj timigas la virinojn. Tioj faraĵoj




LA UTE'OJ EN SOUTH DAKOTA, LABORANTE SUR FERVOJO.

memorigas la frazon de Generalo Nelson Miles, ke "ne estas bona ruĝhaŭtulo krom malviva ruĝhaŭtulo." Kiam li batalis kontraŭ la sovaĝuloj, la frazo estis eble korekta, sed nun ĝi estas troema. Sed ni ne forgesu ke ni havas inter ni estaĵoj kiuj, dum ili vivas, ĉiam kontraŭemos blankulan civilizacion, kaj kiujn oni devas observadi kun malfermega okulo.

S-ro. Leupp diris ke estas la intenco de l' registaro egaligi la ruĝhaŭtulon al ĉiuj enloĝantoj en tiu ĉi lando, kaj dume lin pretigi por la tempo kiam la registaro ne plu zorgos pri li. Tio agado estis sukcesa pri la Navajo'oj. Ĉar kiam tiuj ĉi ruĝuloj havis



LERNANTE LA BLANKULAN CIVILIZACION.



TERPOMOJ ĈE UINTAH, UTAH.

Unufuta mezurilo lokiĝas antaŭ la legumoj por montri la realan grandecon.

malfruktan sezonon kaj la registaro proponis donaci al ili \$20,000 (40,000 sm.) helpe, du Navajo'aj ĉefuloj protestis kaj diris: "Ni ne volas ke niaj junuloj kutimiĝu manĝi la panon de l'registaro."

Bezonas multaj jaroj kaj penoj instrui al la ruĝhaŭtulo lian lokon en la mondo, sed per pacienco la instruado povas efektiviĝi.

D. H. D.

Dresdno, la Ejo de la Kvara Esperantista Kongreso

DRESDENO estas le ĉefurbo de l' reĝlando Saksono, kaj lokiĝas en belega valo sur ambaŭ flankoj de la rivero Elbo, kiun tri pontoj transiras. Inter la gravegaj konstruaĵoj, krom la preĝejoj, troviĝas la muzeo, kiu enhavas faman pentraĵon; la Palaco Japana, enhavanta la reĝan bibliotekon kun 350,000 volumoj kaj belega kolekto da malnovaj manuskriptoj; kaj la teatro, kiu estas unu el la plej belaj konstruaĵoj en la mondo.

La profitoj lernaj, beletristikaj kaj artaj en Dresdno estas multaj. Estas la Politeknika Lernejo, la Konservatorio, la Lernejo de Muziko kaj la Akademio de Belartoj. La fabrikoj ne estas gravaj, kaj la porcelano kiu ricevas sian nomon el Dresdno estas fabrikata ĉe Meissen, 14 mejlojn malproksime. Sed la komerco estas granda, kaj la fervojoj estas divastaj.

Usonanoj ironantaj Dresdenon en aŭgusto kredeble trovos multajn samlandanojn tie, ĉar oni sciiĝas ke la usonana kolonio antaŭnelonge transloĝiĝis el Berlino al Dresdno, pro malplikosteco de vivado tie ĉi.

Estas bedaŭrinde ke la sezono de l' opero ne estos komencinta ĝis post la fino de la Kvara Konkreso (aŭg. 16-22ajn), ĉar operoj kaj koncertoj en Dresdno estas eksterordinare malmultekostaj. La plejkosta sidejo en la oper konstruaĵo estas po \$2.00 (4 sm.), kaj oni povas aŭdi perfekte el la kvara galerio, kie sidejoj kostas nur po 15 centoj (30 sd.).

La redakcio de THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL ŝatos sciiĝi pri la nomoj de ĉiuj usonanoj esperantistaj kiuj intencas ĉeesti la kongreson.

En la marta numero ni havos fotografaĵon de la Kvaro.

The American Esperanto Journal

FEBRUARO, 1908

No. 14

Redaktoro, - - - DĀVID H. DODGE

ŜAJNAS KE NI ESPERANTISTOJ, malgraŭ ĉio, havis malmulton timi pro la Delegacio Por la Enkonduko de Helpa Lingvo Internacia, ĉar ĝi fine aprobis Esperanton. La graveco de tiu korpo estis multe trograndigita. La anoj estas certe eminentaj, sed ilia nombro estis tro malgranda por kaŭzi ian realan ĉagrenon, kaj eĉ se ili estis sin konstatigintaj tute kontraŭ Esperanto, kiamaniere ilia decido estus efektiviĝanta? Por diri la veron, ataki Esperanton estas la samaĵo kvazaŭ oni frapus sian kapon kontraŭ ŝtonan muron. La muro ankoraŭ restas, sed la kapo iom difektiĝas. Malmultaj malgravaj aldonaĵoj estas akceptitaj de l' Lingva Komitato, inter kiuj estas prepozicio *di*, kaj eble malsama silabo de iaj vortoj, sed la Fundamento ne estas ŝanĝita. Kontraŭ ŝanĝo de l' Fundamento ni esperantistoj usonaj staru fortike. Jam THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL ricevis multajn leterojn de sia legantaro aprobantaj nian devizon sur la unua paĝo de l' gazeto; kaj neniajn malaprobantajn. La tutmonda esperantistaro povas fidi je la fidindeco de la usonaj esperantistoj.

* * *

LA NEINTENCITA ŜERCAĴO ne estas la malplej amuza. Ia "esperantisto" antaŭnelonge senpacienciĝis tial ke li ne povis elparoli facile la frazojn: "Ĉu ŝi scias ĉiam ĉion?" kaj "Ĝi ŝanceliĝis ĉar ŝi ne sciis ĉu ĉiuj gastoj ĉeestos ĉe la festoĉambro ĉirkaŭ la sesa"; kaj li eks-anĝis de societo esperantista kies li estis ano estimita!! Li sciigis ke tiujn ĉi du frazojn li ofte kutimis uzi kaj ke li timis rompi sian makzelon. Estas bedaŭrindaĵo ke la malfruemo de gastoj rompigus ies ajn makzelon, sed oni ne devus

mallaŭdi Esperanton pro tio. Sendube oni povas trovi en Esperanto, same kiel en ia alia lingvo, kolektojn da vortoj ne facileparoleblaj sen kelke da peno, sed oni ne rifuzis paroli en tiuj lingvoj pro tio. Ĉu la franco senpacienciĝas je sia lingvo tial ke li ne povas diri rapide: "chacun chasse avec son chien"; aŭ, "six saucissons sont assez s'ils sont six"? Aŭ ĉu la usonano aŭ la anglo decidas paroli nur latine pro tiaj frazoj kiaj: "shoes and socks shock Susan"; "six slick slim slender sailors sailing silently"; aŭ "three thick thumping tigers tickling trout"? Kompatinda eksesperantisto ekstere ekezkilita! Li plendas kaj ploras pro tio, ke la plano de liaj plej profundaj plumplibonigoj nek profitas nek plaĉas, kaj ke ni ne estas pretaj ilin preni plu.

* * *

FEBRUARO ESTIS LA MONATO ŝajne malplej bone estimata de la antikvuloj, kvankam ĝi havas por ni usonanoj du tagojn memorindajn; la naskotagojn de George Washington kaj de Abraham Lincoln. Kiam la tiamaj kalendaroj ne plaĉis al la egiptoj, la grekoj aŭ la romanoj, estis ĉiam februaro, aŭ ĝia ekvivalenta monato, kiu ricevis la tagojn aldonotajn aŭ de kiu oni forprenis tagojn. Kaj nun, ĉiun superjaron, la belaj viroj estas en danĝero, pro la ekstra tago en februaro, de edzecpropono de l' virinoj. Tiun ĉi "kutimon" oni kreditas al Sankta Patriko, kiu cedis al la plendaĵoj de Sankta Briĝeto ke estas multaj virinoj kiuj ne ankoraŭ havas edzojn. Le sanktulo do sciigis ke estos permesate al virinoj proponi edzecon al viroj ĉiun superjaron. La interparolo okazis en superjaro, kaj la sanktulino tuj profitis la fakton kaj demandis la manon de la sanktulo. Tiu ĉi ŝanceliĝis, sed fine rifuzis, donante al ŝi kison kaj silkan robon. Tial, fraŭlo, kiam vi deviĝos bedaŭrinde vin rifuzi al ia bela fraŭlino, vi devas doni al ŝi robon silkan kaj la alian donacon—se ŝi volas ĝin ricevi. Kred-eble, ĉiaokaze, ŝi preferus havi la silkan robon ol vin. Sed, kompreneble, tio ne estos estinta ŝia antaŭintenco!

Pri Demandaro Kaj Respondaro

Al la Redaktoro THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

Estimata Sinjoro:

Esperanto, kiel internacia korespondada lingvo, povus treege helpi plivastigi la sciadon per nova ĵurnalo kuin oni povus nomi: "Tutmonda Demandaro kaj Respondaro." Tia publikigaĵo certe estus tre uzebla kaj tre utila por ĉiulandaj esperantistoj. Ĝi devus formatiĝi laŭ la Londona *Notes and Queries* aŭ laŭ la *Intermédiaire des Chercheurs et Curieux*, de Parizo. Tiu-ĉi lasta enhavas demandojn kaj respondojn pri literaturo, historio, scienco kaj belartoj notetojn kaj kuri-ozaĵojn.

Ni lasu legi atente la anoncon eldonitan de l'Administracio de tiu ĵurnalo:

"La sistemo sur kiu ĝi ripozas estas unu el la plej simplaj. Inter la literaturistoj, scienculoj, popoloj de la mondo, profesoroj, artistoj, kolektantoj, libramantoj, k.t.p., apenaŭ unu sin trovas kiu unu ne spertis, ĉe momento, la bezonon de sin turni al la sciado de aliaj personoj. Tia persono volus scii la devenon de citaĵo, retrovi libron, manuskripton, objekton artan, kelkajn insignojn, dokumentojn genealogiajn, aŭ pravi la verecon de unu teksto, de unu pentraĵo, de unu objekto antikva, k.t.p.; aŭ scii ĉu la temo pri kiu li sin okupas jam estas studita, aŭ ĉu la kolektantoj, la bibliotekoj, la muzeoj posedas pri lia afero kelkajn postsignojn, dokumentojn, k.t.p.; li estas nesukcese ekzameninta la raportojn specialajn, kaj li estas konsiliĝinta kun la lertuloj; ĉe ĉi-tiu momento intervenas l' *Intermédiaire*. Ĝi prenas la demandon kiun oni donas al ĝi, ĉirkaŭen transsendas ĝin, iras frapi kontraŭ la pordo de ĉiuj sciencistoj, de ĉiuj ĝiaj korespondantoj, kiujn ĝi posedas en Francujo kaj en aliaj landoj, kaj, kiel eble plej rapide, alportas la respondon."

Kiu neos la valoron de tia ĵurnalo esperantista? Ĝi devus enhavi malgrandajn sciigojn sub multe da rubrikoj, pri ĉiuspecaj aferoj, kaj ĝi, kompreneble, devus havi alfabetan tabelon detalan de la enhavo de ĉiu volumo. Fine, ĝi multe helpus efektiviĝi ĉie la fratecon de l' homaro. Kore la via.

EUGENE F. McPIKE.

1 Park Row, Chicago, Ill., U. S. A.

Jes; tia ĵurnalo estus sendube valora, kaj la mondo esperanta atendas ĝian aperigon. S-ro McPike faras la proponon kaj nur restas la iniciatulo—kaj la financoj.—RED. A. E. J.

Samos Resana

Al la Redaktoro THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

Estimata Sinjoro:

Mi havas la honoron sciigi vin ke la Samos'a Esperantista Societo, fondita la unuan fojon en Decembro, 1906, kaj post kvin monatoj de estado solvita de la registaro de nia princlando pro malkonpreniĝo de la popolamaso, reviviĝis nun kun la alveno de la nova princo de Samos, lia moŝto Georgo Fil. Georgiadis, kaj tio dank'al la persista militado de la fondinto de la societo, D-ro. Anakreon A. Stamatiadis.

Lia moŝto la princo de Samos donis al S-ro. Zisimo N. Nikolaidis, ĉefa kasisto de la princlando, la komision administri la societon kies komitato estas:

Presidanto: D-ro. Anakrion A. Stamatiadis, kuracisto-direktoro de la sanecaj oficejoj de Samos; vicprezidanto, D-ro. Hizaklis Talassino, direktoro de la princa oficejo; sekretario, Hiraklis N. Nikolaidis, sekretario de la ĉefa oficejo saneca en la princlando; kasisto, Demetrio Stavrino, notario; bibliotekisto, Fr. Berriat, profesoro de la lingvo franca; konsilantoj, Spyridion Eginitis, estro de la ĉefurbo kaj D-ro. Johano G. Konstantinidis, advokato; helpantaj konsilantoj, Deniso Vlasopulo, doktoro-advokato kaj Kristadulos Kapnulas; eforo (kiu ekvalas al konsulo aŭ al informisto de al aliaj esperantistoj societoj), Sro. Raoul Domino Mara Agento.

HIRAKLIS N. NIKOLAIDIS.

Pri la Nova Teknika Vortaro

Al la Redaktoro THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL.

Estimata Sinjoro:

Mi estos tre danka al vi, se vi bonvolos sciigi al la societanoj, ke mi tre deziras korespondadi kun inĝenieroj kaj teknikuloj, precipe pri sciencoj, kaj konstruado. Nune estas necese, ke oni ekpreparu la teknican vortaron de inĝenieraj sciencoj, kaj, pro tiu celo, tre grava kaj tre necesa estas la korespondado kaj la kuniĝo de ideoj. Tutkore via,

HENRI MICHAUD.

Ano de la Parizo Grupo (P.K.); Teknikulo de la Pariza metropolitana fervojo.

Sendube S-ro. Michaud bezonos la helpon de esperantaj inĝenieroj kaj teknikuloj usonaj. Tiujn-ĉi ni konsilas skribi kiel eble plej baldaŭ, sendante proponojn por la vortoj de la vortaro suprecitita.—RED. A. E. J.

La Ĉefdisciplo de Esperanto

ESPERANTO faris el la markizo L. de Beaufront unu el la plej konataj homoj en multaj landoj, por ne diri en la tuta mondo. Sed li estas el tiuj personoj, kiuj amas la ombron kaj sin montras nur kiam ili ne povas fari alie. Eĉ multaj Esperantistoj en Francujo lin ankoraŭ ne vidis kaj nur de du jaroj li konsentis fari oftajn paroladojn. Ĝis tiam li kondukis ĉion: propagandon, societon, revuon, kolosan korespondadon, el sia labora kabineto. Kaj, ĉar li ne volas ke oni disdonu lian portreton, tiu tre konata homo estas aliflanke nekonnata.

Pro tio mi pensas ke mi estas agrabla al mia legantaro, farante la sekvantan priskribon kaj biografion de tiu tro modesta homo.

Markizo L. de Beaufront naskiĝis en Parizo. Kvankam li nun estas kvindekunujara kaj nedireble laciĝis, laciĝas ĉiutage, li ŝajnas havi apenaŭ kvardek jarojn, malgraŭ senhareco, kiu ankoraŭ grandigas sian vastan frunton de pensulo. Ĉio en li restis eksterordinare juna; marŝo, movo, voĉo, rigardo kaj sentoj. Tio frapas tuj kiam oni lin vidas, precipe kiam oni interparolas kun li. Kredeble li parte ŝuldas al tia mirinda konserviteco siajn tre grandajn sukcesojn de parolado kaj sian reputacion de ĉarmisto. Fakte li povus havi dum horoj perfektan atenton de aŭs kultantoj, tiel li renkontas intereson kaj simpation, dank' al voĉo agrablega, varma, karesanta, vibranta, tute rimarkinda, kaj dank' al facileco, aristokratika simpleco de sintenado kaj parolo. Li faras la impreson de homo tre bonvola sed ankaŭ energiega. La ordinara, kutima rigardo en li diras la unuan eon, sed ofte flama kaj potenca brilo montras en ĝi la duan. Observemulo divenas ke tiu homo multege suferis, multege ankaŭ batalis, kaj tio estas vera. Kredeble en tiuj suferado kaj batalado kontraŭ sorto malbona li akiris sian frapantan konon de l' homaro kaj la energion eksterordinaran kiun li montris por enradiki Esperanton ĉie.

Plenvizaĝa, kun brunaj haroj, kaj blonda barbo, kiun li portas pinte ĉirkaŭ la mentono kaj ankaŭ liphare, li estas ordinare pala kun tre blanka haŭto, facile roziĝanta en viveca interparolo. Liaj okuloj estas verde-kaŝtanj-brunaj; ripoze la rigardo montras pens esploriston; kiam ĝi sin fiksas sur vin, vi iafaje vidas ke ĝi bonvole, sed reale, fosas en vi por vin esplori. La brovoj rektaj, harmoniaj,

estas larĝe apartigitaj kaj havas inter si la du sulkojn de l' pensulo, sed modere. La nazo, iomete agla ĉe la radiko, estas preskaŭ rekta kaj havas la karakterizon de l' spriteco, kaj de l' direktado. La buŝo delikate kaj afable ridetas ĉe l' akcepto de vizitantoj, aŭ dum la interparoloj. Mezekreska, ne pli dika ol ordinare la aktivaj homoj de 30 jaroj, senceremonia kvankam tre bonsocieta, la markizo estas tre facile alirebla kaj tre rimarkinde afabla. El la tuta vizaĝo, kaj mi diros el la tuta persono, venas al observemulo tiu ĉi impresio, ke Sinjoro de Beaufront estas antaŭ ĉio pensulo, ke, se li agas, batalas, eĉ se li estas energiega kaj persistega, tion li faras, tia li estas, nur per volo kaj por la penso, la ideo. "Nature," diris amiko kiu lin tre bone konas, "nature li estas artisto, sed la penso lin sklavigis kaj faris praktika *por la aliaj*." Artisto, jes li estas, aparte la muziko lin altiris kaj li tre volonte kantis, ĝis la tago kiam lia voĉo rompiĝis subite kaj lasis al li nur en la parolo parton de la ĉarmo kiun ĝi havis en la kantado.

The British Esperantist diris pri lia vivo, ke ĝi estis preskaŭ romano. Eble, eĉ certe, sed dolora romano. Estante dekdujara li perdis en tri monatoj siajn gepatrojn; edukite poste de angla avino li de la 16a ĝis la 18a jaro perdis du fratojn kaj unu fratinojn pli junajn ol li. Du monatojn poste, li perdis sian avinon kaj restis sen familio. Laŭ formala volo de sia mortanta avino, li, post ŝia enterigo, tuj forveturis Hindujojn kun juna kuracisto, kiu lin edukadis kaj instruadis de kvin jaroj, ĉar tiam Sinjoro de Beaufront estis tre delikata, kaj bezonis por sia sano la flegadon kaj direktadon de specialisto.

Unuigante siajn lingvajn trezorojn, la du vojaĝantoj posedis dekkvar lingvojn. Tamen pli ol unu fojon ili estis ĝenitaj de la lingva diverseco. Pri tio, estante en Benares, Sinjoro de Beaufront havis sian unuan penson pri lingvo internacia farebla el la naciaj. Veturinte Afrikon, post vizito de Hinujo kaj Japanujo, li tie perdis sian akompananton, edukinton kaj amikon, forrabitan de la flava febro. La postvivinto volis sekvi la mortinton kaj pro tio ne forkuris de la epidemio; kontraŭe li flegadis la malsanulojn kaj mortantajn. Sed la vivo obstinas ĉe homo kiu kuras al la morto. Li do konsentis vivi kaj foriris Amerikon. Kvin monatojn li restis ĉu en la sudo

ĉu en la nordo, du nome en Usono, kiun li volonte revidus. Tiam li revenis Eŭropon por sciigi, alvenante, ke dank' al bankroto de bankiero, ĉe kiu li estis transportinta ĉiujn siajn kapitalojn por organizi al si alian kaj fiksan vivmanieron, li nenion plu posedis. Li tiam havis dudek jarojn.

